

Orgaan
van de Bond van
Arbeiders-
Esperantisten FLE

Laborista Esperantisto

In het gebied van de Nederlandse taal

Redactie en Secretariaat van de Bond van Arbeiders-Esperantisten: Nepveustraat 33¹¹, Amsterdam-West 2, telefoon (0 20) 8 21 77
Penningmeester F.L.E., Wingerdweg 53, Amsterdam-Noord, postgiro 331133 · Boekendienst F.L.E., Marnixstraat 57, Haarlem, postgiro 111278

Ĉu ni estas pretaj?

En la kongreso en Antverpeno oni akceptis proponon revalidigi paragrafon 15an de nia interna regularo. Tio signifas, ke ĉiu sekcio devis pagi kongreskotizon laŭ membronombro ĝis maksimume 50 membroj. Laŭ la sama paragrafo la Asocia estraro repagos al ĉiu delegito en la kongreso la vojaĝkostojn kaj parton de la restadkostoj. La avantaĝo de ĉi tiu aranĝo estas evidenta. Eĉ la plej malriĉa sekcio nun povas sendi delegiton al la kongreso.

Kun timo en la koro ni atendis la rezultojn de la sekcioj al la renovigita regulo. Ĉu ĉiuj bone pripensis la sekvojn de la akceptita propono? Ĉu ĉiuj pagus la sufiĉe altan kotizon de f 2,— po membro? Ĉu la grandaj sekcioj ne grumblus kiam ili devas pagi f 80,— aŭ f 100,—?

Sed je nia granda ĝojo ni povis en nia lasta estrarkunveno konstati, ke escepte de du sekcioj ĉiuj sekcioj pagis la kotizon. Kaj je la alia flanko montriĝis, ke nun ankaŭ la malgrandaj sekcioj utiligas al si la okazon reprezentigi sin en la kongreso. Jam sin anoncis sekcioj, kiuj en la lastaj jaroj ne plu vidiĝis en niaj kongresoj. El tio montriĝas, ke la nove-malnova aranĝo kontribuas al pli firma partopreno en la organiza vivo. Kaj tio estas ĝojinda!

Pli aktivan partoprenon ni ankaŭ dezirus sperti de niaj ĝeneralaj membroj. Ofte ni povas konstati ke la kontakto inter la ĝeneralaj membroj kaj la distriktoj al kiuj ili apartenas estas preskaŭ nula. Tio ne estas la kulpo nur de tiuj membroj, sed ankaŭ de la distriktoj. Oni ne forgesu, ke ĝeneralaj membroj estas kiel bastionoj en la dezerto. Tial estas necese, ke la distriktoj de tempo al tempo interkontaktas kun tiuj membroj por prikonsideri ĉu en ilia najbareco io povas okazi. Kaj kompreneble tiuj ĝeneralaj membroj mem kontakti kun siaj distriktoj. Ni estas certaj, ke tiam el pli intima kunlaboro povos esti ebligaj ebloj por propagandi kaj eble...?

Iom post iom oni komencas kompreni, ke nia Asocio estas asocio. Post la lasta agadjaro pli da sekcioj ensendis siajn jarraportojn ol pasintjare. Tamen estas ankoraŭ

tro multe kiuj simple forgesis. Ni ne ŝatas ricevi kaj tralegi la raportojn de sekcioj kaj distriktoj por nia persona plezuro. Ĉar ofte ne estas plezuro. Sed ni bezonas la raportojn por ekhavi kompletan klaran bildon pri nia tuta organizo. Tial ni ankaŭ deziras ricevi la financajn raportojn. Tion forgesis ankoraŭ pli multaj. Ni esperas, ke estontece oni pli bone atentis tion!

Ankoraŭ kelkajn tagojn kaj la urbo de onklo Luks akceptos nian kongreson. La O.K.K. faris sian eblon kaj dum vizito de parto al sekcio Groningen ni povis konstati, ke ĉiuj membroj tieaj avidas doni al la kongreso brilan aspekton.

Ĉu la kongreso laŭ enhavo ankaŭ fariĝos brila dependas de la delegitaro kaj de la gvidado. Rilate tion ni povas esti trankvilaj ĉar ni kutimas en niaj kongresoj trakti ĉiujn aferojn en kamaradeca maniero.

Tial nia Asocia Estraro kuraĝis veni kun propono plialtigi la kotizojn. Ni scias, ke kelkaj personoj kaptos ĉi tion kiel argumenton por ekŝigi. Sed al ili ni diru, ke tio ne estas ĝusta. Lastan fojon la kotizo plialtiĝis en 1958a. Kaj nun oni komparu la kostojn por ekzemple la eldono de nia gazeto en 1958a kaj nun. Tiam oni komprenas, ke ni ne povis ne veni kun tia propono.

Ni ankaŭ aŭdis la rimarkon, ke ni adapti la elspezojn al la enspezojn. Ho jes, tio estas konata proverbo nederlanda de tering naar de nering zetten). Sed ĉu ĝi estas ĝusta? Jam dum pluraj jaroj ni ne sufiĉe faris, kion ni fakte devas fari laŭ nia komisiono, nome propagandi tiom, kiom necesas. La nun proponita kotizplialtigo ne donos al la Asocia kaso grandegan kapitalon, sed ĝi malhelpas, ke la elspezoj superos la enspezojn. Kaj, se restos iom, tiam tiu resto povos pligrandigi nian eblon propagandi.

Ni plene subskribas la opinion de Doco en „Nia Ligilo” de Marto, ke „tiu propono pruvas kreskantan aktivecon”.

Cetere oni relegi nian gvidartikolon en Laborista Esperantisto de januaro 1964a.

Krome ni ne povas ne esprimi nian miron ke estas sekcioj, kies kotizoj estas tiom malaltaj, ke ili per tio nur povas pagi la kotizojn al la Asocio kaj distrikto. Aliaj ne povas formi ian rezervon por propagandi. Tio ne estas defendebla. Tiuj sekcioj kaptu la okazon samtempe plialtigi siajn proprajn kotizojn.

Oni deziras pli da aktiveco? Bone, ni aplaŭdas tion. Sed kial do la sinanoncoj por partopreni la semajnfinojn de la Faŭlhaber-fondaĵo envenas nur gutgute? Aŭ ĉu estas tiel, ke oni atendas la plian aktivecon nur de aliaj kaj mem preferas resti hejme ĉe la televidaparato?

Kaj ĉu la lingva kapablo de ĉiuj jam estas tiom altnivela ke neniu bezonas pluan instruon? La Faŭlhaber-fondaĵo ankaŭ en tio ŝatas servi al vi kaj per tio al nia movado.

Ĉu ĉiuj sekcioj estas pretaj, kiam eventuale la Asocia Estraro bezonus vian helpon por iu formo de propagando? Kaj ĉu ĉiuj membroj niaj estas pretaj, kiam ni eventuale bezonus korektantojn aŭ/kaj kursgvidantojn?

En nia propono vi povis trovi proponon de Hago koncerne la instaladon de laborgrupo, kaj por ellabori kvinjaran planon. Se tiu propono estos akceptata — kaj ni ne dubas pri tio — ni atendas en la venonta epoko pli da aktiveco. Kaj tiam ni ĉiuj devas esti pretaj por akcepti la taskojn, kiuj tiam estu plenumotaj. Ne lasu la laboron al aliaj.

Doco skribis en la jam nomita numero de „Nia Ligilo”: „Celkonscie ni fasku niajn fortojn por ne perdi energion kaj tempon por atingi la eblan progreson”.

Ni plene substrekas tion, sed ni plej insiste aldonas, ke por tio necesas, ke la kontakto inter ĉiuj instancoj de la Asocio estu kiom eble plej forta. Nepre necesas, ke ĉiu membro, ĉiu sekcio kaj ĉiu distrikto estu preta. Jam nun faru ĉion por povi jese respondi kiam aŭdiĝas la demando: Ĉu vi estas preta?

(ne-korektita)

Foeke de Vries

Lingvo senlanda

Kun plezuro ni prezentas ĉi tiun artikolon al niaj legantoj. La enhavo estas progresema kaj certe elvokos reagojn. Ni esperas ke la reagoj estos same progresemaj kaj bone pripensitaj kiel ĉi tiu artikolo.

Neniu disputas, ke Esperanto estas vivanta lingvo. Por ĝin lerni oni devas tamen esti optimisto, sin persvadi ke ĝi havas pli certan estontecon ol ekzemple la kimra, postvivanta ĉiam pli malforte inter ĝemaljunuloj en la montaroj de okcidenta Britujo, kies angla lingvo jam ĉien penetris kiel administra lingvo de la princlando Kimrujo. Popolnombro pruvas ke ĉiam malpli la kimra estas uzata (en 1961 de 656.000 personoj), kaj efektive la kornvala pereis antaŭ 200 jaroj.

Ĉu Esperanto kun ĝia precipe papera kulturo kaj proksimume la sama nombro de uzantoj havas pli bonan ŝancon?

Malgraŭ nia CED-organizo (Centro de Esploro kaj Dokumentado), grave mankas fidindaj statistikoj pri disvasteco de Esperanto. En aŭgusto 1963, brita teledivido diris, ke ĝi estas parolata de proksimume 1.000.000; sed Mario Pei, bone konata filologo, pritaksas en „Unesco Courier”, novembro 1963, la nombron de esperantistoj je 8.000.000. Kion oni prenas kiel bazon? Kiel difini esperantiston? Laŭ Zamenhof (Bulonja Deklaracio, 1905), „ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon.” Ĉu inkluzivi la vastan armeon de veteranoj nun ripozantaj hejme sen plu ĝin uzi? Ĉu komencanton de unu semajno? Ĉu kursfininton, kiu perdis intereson kaj deklaris ke li forlasis la movadon? Se por bono de nia moralo ni ĉiujn ĉi kategoriojn inkluzivas, enketas en limigita regiono (kiel faris la verkinto en orienta Kent), ĝis tuta elĉerpiĝo de ĉiu fonto, kaj faras kalkulon en proporcio, ni konkludas, ke la maksimumega cifero por la tuta mondo estas nur rondcifere 500.000. Kaj plue konstatinte kun terura elrevido, ke malpli ol la triono respondis en Esperanto al simpla demando, ni konkludas, ke la nombro de eĉ malbonaj parolantoj estas ne pli ol 160.000. Sed en Afriko kaj Azio pro malrapida informado, manko de instruistoj kaj analfabetismo, ankaŭ en Usono pro supereco de la angla lingvo, la proporcio inter granda loĝantaro estas multege malpli ol en orienta Kent; se ni rajtas pro tio dividi per tri, restas en la mondo nur rondcifere 50.000 esperanto-parolantoj, anstataŭ la ok milionoj de Mario Pei. Estas realisme supoziti, ke meza Universala Kongreso altiras 4% el la parolantoj de la mondo.

Jen do unu faceto de nia misinforma propagando. Ni finas trompante ankaŭ nin mem, kaj vivas en falsa paradizo, samkiel ni faras dirante ke la lingvo estas uzata en ĉiuj situacioj de normala vivo. Kie en normala butikoj, fabrikoj? Se ĉiuj esperantistaj butikistoj venos labori sur sama strato, tiam oni povos butikumi en Esperanto, t.e. sen antaŭe esti lerninta la tiean nacian lingvon.

Konstatebla nuntempe en Anglujo estas inter niaj vicoj speco de cedemo antaŭ malfacilaĵoj, ĉar la atesto de la sentumoj (ke la movado stagnas) konfliktas kun la

arda deziro, ke niaj senlaciaj klopodoj de 60 jaroj ja kunportu fruktojn. Pli realisme, estas certe ke, sen sociaj bazoj kiaj ekzistas por naciaj lingvoj, Esperanto absolute ne povas allogi nek reteni la intereson eĉ de tuta generacio de infanoj devige instruataj en la lingvo en la lernejoj; do restos en la movado kelkaj idealistoj, kelkaj diletantoj, dum la filistoj daŭrigos amatore studadon de la itala lingvo en vesperinstituto cele al feria vojaĝo al Florence. Kiaj do estas sociaj bazoj de lingva uzado? Ĝis kiu grado nia movado konscie provis ilin starigi, kiel konscie Zamenhof kreis la lingvon? Escepte de ĝiaj arkitekturo, muziko, skulptado kaj pentrado, ĉiu kulturo estas firme enradikiĝinta en la lingvo, tiel ke iusence la lingvo trenas la kulturon kaj ne inverse, kvankam beletristiko — estante kvazaŭ lingva artformo — fariĝas ankaŭ siavice respegulaĵo de popola kulturo, kaj eĉ la senvortaj artoj de diversaj lokoj varias laŭ vivmaniero kaj precipe laŭ pervorte interŝanĝataj ideoj. Pro tio ke esence de civilizita homo estas emo kaj eblo interrilati pri estonta materia kaj spirita progresado, ne estas dubinde, ke nacie socia kunvivado kuŝas ĉe la fonto de ĉiu manifesto de popola arto. Esperantista vivo estas nur socia, neniam socia, kvankam la potencialon ĝi ja havas.

„Ĝis nun kulturo povis esti nur nacia; estonte, dank' al Esperanto, ĝi povas fariĝi tutmonda, paralele al disvastiĝo de la civilizo, kiu estas esence homara.” (Plena Vortaro). Sed tiu tezo subkomprenigas, ke iun belan tagon levigos esperantista nacio, almenaŭ internacio, dum atesto de racia observado insistas ke, 51 semajnojn ĉiujare, esperantistoj vivas kaj vivos en pure nacilingva etoso kaj kulturo. Se la Universala Kongreso estas la ĝis nun plej grava socia bazo de Esperanto parolata, kaj tial la plej fidela alproksimiĝo al „Esperantujo,” la tutmonda kulturo estos por nur 4% el la esperantista popolo dum 2% el ĝia vivo, nur ke la ceteraj devos sin kontentigi, kiel ekzilitoj, de korespondada kulturo, kaj legado.

Korespondado sukcesas kiel populara socia rimedo en Esperanto nur ĉar kiel la Universala Kongreso, ĝi estas ekskluziva. De la kongreso ni ekskluzivas la ceteran mondon; de la korespondado ni ekskluzivas ĉiujn, escepte min kaj vin. Lastatempe ekestiĝis kutimo korespondi per cirkuleroj, kio efikas kvazaŭ oni alparolas kongreseton surpapere, sed ĝi restas ekskluziva; unu skribas, multaj legas, samkiel ili intertempe sorbas internacian kulturon pasive pere de libroj kaj sennombraj periodaĵoj.

Simile efikas radio-dissendoj, sed ankaŭ ĉikaze oni bezonas privatan ĉambron por ne esti ĝenita de „normalaj homoj” de la familio. Oni povas, kondiĉe ke oni loĝas proksime al lingva landlimo, pli aktive serĉi la interkulturon, ofte vizitante eksterlandajn amikojn, kaj tio estas sen-dispute la plej kontentiga maniero uzi Esperanton, kvankam denove oni sentas embarason en ĉeesto de familianoj de la amiko; cetere, por lin atingi sen malagrablaĵoj, estas praktike lerni ankaŭ la

fremdan nacian lingvon, kaj fine de kulkulo Esperanto estas apenaŭ necesa! Ĉiukaze, neniu povas vere pledi ke, praktike ĉiujn ĉi formojn de kulturo, oni ekkonas la mensojn kaj dividas la pensojn de aliaj nacioj, donite ke neniu esperantisto estas normala franco, anglo, ktp, kvankam troviĝas en tiaj aktivecoj la ĝermo de neŭtrale homa kulturo.

Por ilustrati la falsan premison, ke esperantista popola kulturo povas ekzisti sen ĉirkaŭanta ĝin nacia Esperantujo, ni prenu kiel ekzemplon figurojn el la cetera tre bona infanlibro „Amuzo per Scienco.” Sur paĝo 33, Christine faras tubojn el ĵurnalo, sur kiu estas facile legebla, „Is this you?” Sur paĝo 86, skribas inverse per helpo de spegulo, „Meet me at the barn.” Sur paĝo 87, ŝi prenas sodon el paketo markita, „Washing Soda Crystals — Outstanding Value.” Sur paĝo 95, Barry skribas per nevidebla inko mesaĝon kiu poste evidentiĝas, „Calling all agents.” Nu kompreneble ke ne pervaloras fari specialajn kliŝojn por tubo farita el „Heroldo”, kaj sodo farita speciale por kongresa uzo, sed oni forte dubas ĉu la infanoj, eĉ ekster Anglujo, skribas inverse, „Rendevuo ĉe la grenejo,” aŭ per nevidebla inko, „Alvokas ĉiujn agentojn.” Ili estas multe tro realismaj, kaj sendube faras la eksperimentojn nacilingve. Ĉiuj aktivecoj de nia komune homa vivo devos finfine disvolviĝi sur ĝusta fono, kun stratnomoj, radio- kaj televido-programoj, edukado kaj vivtenado tute en Esperanto, antaŭ ol la vasta publiko serioze traktos kun ni, ĉar ankaŭ ĝi estas realisma, kaj pli ol unu ne-esperantisto scivolvis, kial ni ne starigas propran landon. Kaj tion ni certigos, ne petante ke granda televidea instanco dissendu al tuta lando en Esperanto paralele kun iu kimrolingva programeto, sed nin kolektante sufiĉe grandnombro en unu loko multe pli longe ol unu semajnon, kaj starigante la propran rektan cirkviton, por doni nur unu ekzemplon.

Ĉirilate, estas interese konjekti, kiom da esperantistoj loĝas sur Esperanto- aŭ Zamenhof-strato, kiom pripensis eblecon translokiĝi tien, kaj kiom da jam tie loĝantoj scias, pri kio temas.

Imagu, se nur 1.000 el la 50.000 esperantistoj de la mondo translokiĝos al Dovro (pensiuloj kaj rentuloj) eĉ por pasigi nur unu jaron en Esperantujo, estos jam po unu en la aŭtobusoj, kaj oni rajtos sen esti frenezulo voĉ-krii, „Ĉu ĉeestas esperantisto?” — Kaj tuj venos almenaŭ unu. Ne vana revo, ĉu? Ne estus longe antaŭ ol

(daŭrigu sur paĝo 19)



„La Papalagoj” estu en via Libroŝranko!

Ni ricevis

„Verdiro”: Elingita glavo.

Originala artikolaro ĵurnalisma. — Selektajo de C. D. A. Capp. — Enkonduko de W. A. Gething. — Stafeto: Beletraj kajeroj, 14. — J. Régulo, Eldonisto, La Laguno, Kanariaj Insuloj, 1962. — 19 × 12 cm. 148 paĝoj. — Prezo: f 4,60.

Emba (Emeriko Baranyai): Ekzilo kaj Azilo.

Poemkolekto. — Prologo de Norberto Bartelmes. — Stafeto: Beletraj kajeroj, 15. — J. Régulo, Eldonisto, La Laguno, Kanariaj Insuloj, 1962. — 19 × 12 cm. 164 paĝoj. — Prezo: f 5,75.

Ivan St. Georgiev: Provo alfronti la vivon.

Antaŭparolo de William Auld. — Kovrilo de David Hastie Yong. — Stafeto: Beletraj kajeroj, 16. — J. Régulo, Eldonisto, La Laguno, Kanariaj Insuloj, 1962. — 19 × 12 cm. 112 paĝoj. — Prezo: f 3,80.

Nova revuo: Ripozoĵ

Ek de la 1a de januaro 1964 en Sofio, Bulgario, aperas nova, dumonata, 32-paĝa revuo Ripozoĵ, presita sur luksa papero en kvar koloroj. Ĝia enhavo ampleksas distran kaj belartan legaĵon, artikolojn pri turismaj objektoj kaj somerrestadejoj, pri historiaj kaj kulturaj monumentoj, pri internaciaj sportaj eventoj k.a. Ĝi regule informos pri vizitoj de fremdlandaj esperantistoj al Bulgario kaj pri reciprokaj vizitoj inter bulgaraj kaj fremdaj esperantistoj. Jara abono \$ 1,5, kiun sumon oni sendu al U.E.A., Nieuwe Binnen-

weg 176, Rotterdam, aŭ al: La Redakcio, bulv. Tolbuhia 51, Sofio, Bulgario.

De Ĉina Esperanto-Ligo ni ricevis donace kalendaron esperant-lingvan. La belege prizorgita kalendaro montras 24 bildojn de la belstila ĉina pentroarto. Ĝi vere estas trezoro pro la ilustraĵoj kaj la bona prizorgo. Nur pro tiu donaco oni povus aboni la revuon „El Popola Ĉinio”!

Jarlibro 1963 de UEA, Dua Parto, aperis ĉimonte. La Dua Parto, kiel kutime, enhavas la raportojn de la estraro, de diversaj komitatoj, de la landaj, fakaj kaj neneŭtralaj asocioj ktp. Krome ĝi enhavas ĉijare raporton pri la Esperanto Morsa Kodo, preparita de trihoma Komitato, en konsultaj rilatoj kun estrarano de UEA. Ni ne kapablas juĝi pri la enhavo de la proponita kodo, ne havante sperton en uzado de iu ajn kodo. Sed pri la linio „la kodo restas provizora ĝis 1965a jaro, kiam UEA konsideros plenan agnoskon”, ni opinias ke agnosko de tiaj aferoj apartenas ankaŭ al la Lingva Akademio.

Radio Praha eldonis kalendaron 6-lingvan por 1964, kiun ĝi donacis al personoj kun kiuj ĝi regule kontaktas. Kvankam la ĉeĥa lingvo estas interesa, same kiel la hispana, speciale kiam oni ne komprenas la lingvojn, ni ne dubas pri la bonvolo de la eldonintoj, sekvontjare aperi kalendaron kun esperantlingva teksto. Cetere la bildoj, reproduktoj de la pentristo Josef Liester, donas agrablan impreson pri la moderna ĉeĥa pentroarto.

KORESPONDPETOJ

Bulgara fraŭlino Sumeonka Dimitrova Jvanova deziras korespondi kun nederlandano. Ŝi intencas viziti la U.K. en Hago, persona renkontiĝo ĉijare do verŝajne iel estos ebla. Adreso: str. „Odrin”-1, en urbo Jambol.

Ĉeĥa fraŭlino Vladimira Polednova, Ŝirava 20 en urbo Prerov, ankaŭ deziras korespondi kun nederlandaj gesamideanoj.

La sperto instruas, ke toleremo estas malofta floro ankaŭ en nia esperanta ĝardeno.

(W. en „Rio Esperantista”)

„Faulhaber-Fondaĵo”

Ni ricevis en la pasinta monato la sekvontajn donacojn:

k-do I. Sanderse, Den Haag f 0,75
k-dino M. E. v. Buuren-de Vries,
Haarlem f 2,50
gek-doĵ Kwantes, Haarlem f 5,—
k-dino S. de Weerd, Kapellen (B) .. f 17,—
k-do H. van Hulst, Haarlem f 3,20

Al la donacintoj koran dankon!

ĉiu enmigrinto faros paron, ne per korespondado, sed per rekta amikiĝo kun nova adepto el inter la antaŭe skeptikaj civitanoj de fiera Dovro, — kaj tuj tie estos 2.000.

Ĝis nun Esperanto estas nur tre plezuriga tempo-pasigilo por unu vespero de la semajno. Jen la kerno de la nova realismo en la movado, klarigo de ke oni ne aliĝas facile al ĝi, sed facile ĝin forlasas. Lingvo senlanda ne havas lokon en la moderna mondo. Ni kreu la landon, kies civitanoj, eble estinte senŝtatoj sen espero aŭ fuĝintoj for de la premo de netolerebla suferado, fariĝos elito de la movado kaj de la mondo, homoj kun unika privilegio uzi nur unu lingvon — Esperanton. Por ili ekzilo fariĝu azilo, sed pozitiva, en ke ĝi montras la vojon kiun plejparto el modernaj esperantistoj ne sekvos, ĉar, kontraste al unuaj Zamenhofanoj, ili sin regalas en bonstato, bonfarto, sekuro, veluro. Kie estas sufero, estas ankaŭ espero; sed unue necesas ofero.

Esperantujo estu ankaŭ pilgrima centro, modelo por ĉiu internacia fokuso de monda agado kiel UN (Nova York), Parlamento de Eŭropo (Strasburgo), Centro de Popola Radio-Telekomunikado (Luksemburgo), Sidejo de Komuna Merkato (Bruselo), Tri-Potenca Administrejo de Unuiĝinta Berlino, Neŭtrale Lingva Pac-Komisiono por Brusela Regiono — kaj kio ne?

Ni estu tamen kontentaj komenci de modesta kvartalo por movadaj veteranoj en Dovro. Por detaloj pri entreprenadaj paŝoj por ekrealigi la projekton, mendu po 2 rpk ekzemplerojn de „British Esperantist,” julio 1962, ĉe Dovra Soleo, 14B Castle Avenue, DOVER (Kent), Britujo.

AANMELDINGSFORMULIER

Inzenden 6 weken vóór het examen, als brief aan de secretaresse-penningmeesteresse H. A. Mulder, Zilvermeeuwstr. 29, Badhoevedorp, tel. K 2968-2405 De examens voor diploma E, M en S vinden plaats te Amersfoort, op zaterdag 16 mei 1964.

De kosten voor deelneming zijn:

Voor examen E f 12,—; voor examen M f 16,—; voor examen S f 20,—.
Voor hen, die lid zijn van een der organiserende verenigingen of van NoSoBe respectievelijk f 7,50, f 10,— en f 12,50; voor werkloze leden de helft; kinderen (tot 18 jaar) van leden betalen eveneens de helft.
Kandidaten, die de eerste keer niet slagen, kunnen binnen 1 jaar deelnemen aan een volgend examen, waarbij vrijstelling wordt verkregen voor vakken, waarin minstens een 8 is behaald.

Ondergetekende wenst deel te nemen aan examen E/M/S 1) dat gehouden zal worden te Amersfoort op zaterdag 16 mei 1964, waarvoor rij/zij het verschuldigde bedrag per postgiro no. 206152 heeft overgemaakt.

1. Naam:
2. Voornamen:
3. Adres:
4. Woonplaats:
5. Beroep:
6. Datum en jaar van geboorte:
7. Plaats van geboorte:
8. Lid van:

Bestudeerde literatuur (alleen voor M- en S-kandidaten)

1) Doorhalen wat niet verlangd wordt.

Nova jaro ★ Novaj iniciativoj

(ni metu Esperanton meze en la tutmondan fenestron!)

(II)

Feliĉe mia dentaro jam ne igos min senti doloron, kiam post? jaroj iu historiisto komunikos:

„En la malalta lando ĉe Norda Maro, antaŭ kaj kelkdek jaroj post la dua mondmilito pli malpli aktivadis iu fanatika sekto, kiu nomis sin „Laborista Esp. Asocio”. Pro maljunigo de la disĉiploj ĝi malaperis el la mondo, kiel finbrulinta kandelo”.

Daŭrigi tiun ekzistadon eĉ ne eblas en la kuraĝiga situacio, en kiu nia Asocio troviĝas (kaj tre feliĉe ankaŭ pluraj grupoj!), ke la estraranoj, spite tro oftajn seniluziigojn flanke de la „ordinaraj” membroj, kvazaŭ nevundeblaj batalemuloj restadas surpostene en la unua linio!

Ĉiloke mi tamen opinias utile atentigi pri preskaŭ neniam ĝustatempe rekonata danĝero:

Fojfoje en membrar-kunveno mi aŭdis prezidanton esprimi dankon al la ĉeestantoj, pro la rapida kaj „glata” pritraktado de la tagordo... Tamen en ĝi povas esti kerno de regreso!

Manko de kritiko, ja povas esti ĝi pro manko de vigleco/interesiĝo; ja ofte iu „neŝatata” kritikemulo estas iu, al kiu „la afero” fiksiĝis en la koro!

Sed mia propra sperto devigas min diri, ke ne kamaradece farita kritiko fermas la pordojn por atingi interkompreniĝon kaj kunlaboradon!

Estas ankaŭ alia danĝero:

Estrarar(ano) — ofte senkonscie — ekhavas la ideon aŭ impreson, ke **nur** li/ŝi kapablas fari ĉi certan agadon. Ekz. pro tro ofta, vane farita klopodo altiri alia(j)n, oni jam ne pli klopodis kaj (cetere tre kompreneble!) kutimiĝas mem — estrare aŭ individue — fari ĉion!

Tamen estradi signifas **antaŭen - vidi!**

Nenia laboro de iu ajn farita, estas nefarebla por iu alia. Krome, eĉ ĝiskerne sana homo povas malsaniĝi... kaj tiam? Tial vere ĝuste aganta estrarar(ano) neniam malkuraĝu informiĝi en la kunvenoj aŭ en tiucela organo) ĉe la anaro pri „volontuloj” por ĉia ajn helpagado. Ĉi loke mi pensas ekz. pri Schiedam (se mi ne eraras en la grupnomo): Tie oni sukcesis kompili aŭ formi „komisionon” por serĉi „novajn vojojn” rilate al nia propagando. Nova sango, do nova iniciativo... jam mi aŭdis pri la unuaj sukcesoj!

Neniam oni malakceptu proponatan helpon! Kiam la helponto(ino) ne tuj „kapablas” fari ĉiujn necesajn laborojn, iom post iom tiu helpo fariĝos absolute alte taksinda. Kaj... iu membro, kiu per ia aktiveco partoprenas en la agado, preskaŭ ĉiam estos fidela membro. Estas do plurflanke tranĉa klingo:

Per (se eĉ nur penego ebla) „formado” de helpanto aŭ komisiono oni aktivigas membrojn, kiujn oni (pli) fikse ligas al la movado, per kio — eble — alteriĝas fonto da nova sango, do novaj iniciativoj! Samtempe la estrarar(ano) liberigas al si la manojn kaj spiriton por aliaj aktivecoj... aŭ iom pli da libera tempo!

Eble iu demandas kiucele formi komisionon?!

Por cento kaj pli da agadoj, el kiuj nur kelkajn mi nun nomu: komisiono por propagando; aranĝi kaj pretigi necesojn por ekspozicio, kompili kunven-programojn petante po iuj la kunlaboron de ĉiu membro (kaj profite al ĉiu membro!), per

legado (kiom eble helpe de nia gazetarservo) de internaciaj Esp. gazetoj kolekti la plej gravajn novaĵojn pri la disvastiĝo/uzado de Esp. kaj kiel „Novaĵservo” komunikadi ilin en la kunvenoj, k.t.p., k.t.p. Mi povus pleniĝi tutan L.E., pro kio kelkiuj dubus pro mia „saneco”.

Ni transiru al alia faceto de „nia aktiveco en 1964”.

Jen do, nun estas la parolo (pli bone la ago!) al vi, al tiuj, kiuj estas pretaj aktivigi kaj aktivigi!

Unue, montru per via partopreno (eĉ nur foje!) en la ĝenerala grupvivo, ke la estraranoj staras ne solaj en la ondarsultado. Parole, skribe, agade k.c. montru, ke vi pretas fari „ion” por la eklevo de ĝi el la impaso en kiu ĝi (en nia lando) troviĝas.

Sed, samtempe konsciiĝu, ke ni jam ne vivas en tempo en kiu organizo-motora restadas funkcii sole per idealismo! Nederlandlingve ni kutimas jam diri: „Stonmalmola Tempo”, per kio fakte estas dirite, ke nur tiuj, kiuj apogas „sur la praktiko”, ankoraŭ havas ŝancon en la nuntempa socio. Jam antaŭ la lasta(?) milito mi aŭdis la aserton (de S-ro G. Bosch el Valencia):

„Laŭmerite honoro D-ron Zamenhof estas bone. Sed, kiam la Esperantistoj deziras akceptigi la lingvon, por kio ĝi estas kreita, tiam oni **foje** laŭdu la kompilinton, sed **ĉiutage** marteladu sur la ambojn de la praktiko! Iru eksteren!

Pruvu la ne kalkuleblajn profitojn tiel en la studado de kiu ajn lingvo (do studohelpilo!), kiel en plurlandaj konferencoj k.c., en internacia komerco, sporto kaj la milionojn ŝpareblajn per uzado de Esp. k.t.p.

Idealismo kaj sinoferemo de ekz. Zamenhof jam ne interesas al la nuna generacio. Ni do ne serĉu nian forton en la „infan-suferado” de D-ro Z.; ni mem ĉiel kaj multe pli ol ĝis nun iru eksteren kaj praktiku la lingvon! (Pri ĉi tio poste pli.) Al la mondo, al la publiko ni atentigu per nekontraŭ-direblaj **faktoj** el la persona, pogrupa, dumvojaĝa, komerca, kongresa uzado, utilo, profito k.t.p.

Ne en Esp. rondo ni atentigu pri la nemanckipova dua lingvo akceptebla por ĉiu popolo kie ajn sur nia planedo, sed al la eksterstaranta **publiko**.

Antaŭ ol transiri al alia punkto, utilas averti pri eventualaj mistrafoj, kontraŭagadoj k.t.p.

Eĉ inter „samideanoj” kaj do multe pli interkontakte kun neesperantisto, ĉiu aktiva renkontas pli-malpli „noblajn” kontraŭ-agojn...

Ni vestu nin per kiraso kaj malatentados eĉ la denaskan konservatismon aŭ personan enviecan konduton de samgrupanoj.

Ni metu esperanton meze en la montrofenestron de la tuta mondo!

Kiel? Mil ebloj ekzistas, sed mi nomu kelkajn:

Kiamesperantisto intencas viziti alian landon, — se eble eĉ kiam temas pri profesia vojaĝo —, oni kiom eble longtempe antaŭe interkontaktiĝu kun esperantisto(j) el la koncerna lando aŭ urbo, kiu(j)n oni vizitos. Certe al la vizitota(j) esp.isto(j) tiam eblos aranĝi ian „porpublikan” aŭ alian kunvenon. Ĉi kaze mi pensas ne

(nur) pri Esp. kunveno, sed ekz.:

Min vizitis Hispana kamarado; al la plej altranga „ĉefo” en mia laborejo mi petis permeson gvidi tiun amikon (en libera tago mia!) tra nian konstruaĵon.

Poste mi havis la saman bonŝancon kun Ĉina amiko kaj jaron poste kun Japana profesoro!

Ĉi lastan fojon mia plej alta ĉefo (tiel-nomata instruitulo!) invitis nin veni en sian apartejon (oficejon). Li ja intencis montri al mi, ke per la Angla lingvo li havas minimume la saman rezultaton kiel mi per Esperanto.

En la konversacio la profesoro fojfoje sin turnis al mi (en Esp!) por savi ilin el lingvo-malfacilaĵoj, kaj al mia ĉefo li klarigis:

„Por ni Japanaj universitatoj kaj do pli por la ne instruitaj Japanoj, la Angla lingvo estas nefacile lernebla kaj eĉ pli malfacile prononcebla!”

Kaj mi paroladis kun li kiel kun samlandano! Jam neniu en la laborejo priidris Esperanton kaj la jaron poste mi gvidis du kursojn en salono de la ĉefpoŝtoŝticejo en Haarlem!

Plenan kunlaboron mi havis i.a. de la Direktor-Ĝenerala, de la Kontroloro (samaltranga oficisto!) de la Direktoro k.t.p.

Alia ekz.: Kun mia amiko mi vizitis Schagen kaj nia ĉiam aktiva K-do Winkel aranĝis prelegon (kun tradukado nia) en lernejo. Ĉeestis multaj tre atente aŭskultantaj lerneĵanoj, instruisto, lernejestro kaj ĵurnalisto. Krome en „Schager Courant” aperis granda artikolo kun foto; do ankaŭ la publiko — legantaro — „ĉeestis”! Ne eblas ĉion rakonti, sed tian propagandon pluraj el ni foje povus fari; amiko Winkel certe pretas ĉiel helpi, aranĝi, klarigi kiel atingi sukceson. K-do Winkel ja ne nur unu fojon aranĝis tian spektaklon.

„Mia sperto, via averto”. Oni bone komprenu, ke necesas kompleta renversiĝo en multa rutin-pensado... estas ja tiel pli facile diri al „ĉio nova”: „Estas jako, kiel frako!” (één pot nat) ol ŝanĝi sian dumjaroj kolutimiĝintan, ĉiam saman agadon: Unu fojon en monato oni vizitas kunvenon...; (al estraranoj:) preskaŭ ĉiun minuton de l’ „libera” tempo oni kunvenas, kaj pro tio Esperanto triumfos... aŭ ne! Preskaŭ ĉiam la samaj personoj aranĝas la programon; preskaŭ ĉiam tion faras „la estraro” anstataŭ (eĉ pene!) klopodi aktivigi aliajn por foje aranĝi ion! Tio miaopinie estas sufiĉe grava misago, spite la bonan volon por ekatenti pri ĝi, sed, ankoraŭ pli grava manko en ĉies nia agado: Ni preskaŭ tute forgesas iri eksteren kaj faskiĝinte nian energion, ĝin direkti **al la publiko**.

Ĉu ekzistas pli da individuaj propagandobloj? Kiam vi estas butikisto, kontoristo, laboristo, unuvorte kiam vi iel ajn „perlaboras” vian panon, senescepte foje viaj gekolegoj „ial kunvenas”.

Kiam la temo de tia kunveno taŭgas por tio, vi petu al la aranĝantoj: „Por pli-agrabligi tiun kunvenon — ĉu oni akceptos, ke mi montros kromo-fotografajojn (dia’s) pri eksterlanda vojaĝo? (aŭ alia tiucela temo.) Kiam vi mem ne kapablas sola fari ĉion, eĉ pere de L.E. vi povus peti ies helpon kaj — se necese — la materialon vi eble povus akiri de ambasadoro. En tia „prelego” lertulo trovas okazon „hazarde” aludi pri Esp. kaj duan fojon oni jam tute malkaŝe povus paroli pri per-Esperanto-vojaĝo.

(daŭrigo sur paĝo 23)

OPGAVE 3.

Onder de folklore van een land verstaat men al de oude gebruiken en gewoonten die nog onder het volk voortleven. Hiertoe behoren ook de resten van het oude volksgeloof die men nog in verschillende streken aantreft.

Men kan spreken van de folklore van een land maar ook van de folklore van een bepaalde streek.

De folklore van een land heeft betrekking op meer algemene zaken die de kinderen van de ouders overnemen en waar men naar leeft, werkt, zich vermaakt, spreekt en zingt.

De folklore van een streek dankt zijn vaak eigenaardige gewoonten aan vroeger isolement en bepaalde gebeurtenissen en is verbonden aan de plaatselijke aard van de natuur.

Er kan sprake zijn van een eiland, waar water een belangrijke rol speelt, van bergachtig gebied, van bossen of van vlakke velden.

De volksgebruiken zijn honderden, soms duizenden jaren oud. Geen wonder dat degenen die ze nog in ere houden, de oorspronkelijke betekenis niet meer kennen. Over het ontstaan van een gebruik bestaan vaak verschillende en soms tegenstrijdige lezingen. Velen houden zich thans bezig met de beschrijving van de folklore en zij trachten die uit het verleden te verklaren.

Door het toenemende verkeer en andere oorzaken zijn veel volksgebruiken in het vergeetboek geraakt.

VERTALING VAN OPGAVE 2.

La lasta jarcento vidigis serion da renversoj pri la ebloj de komunikado. Spite al malserenaj antaŭdiroj la novaj metodoj ne forigis malnovajn rimedojn; ili ofte eĉ kontribuis al ilia kresko.

Ekzemple, en vasta rondo oni eĉ atendis, ke la radio mortigos la gramofon-industrion. Laŭmezure la radio pli kaj pli elsendis novaĵojn, multaj supozis, ke la gazetaro perdos sian plej gravan motivon de ekzistado. En ambaŭ okazoj la timo montriĝis senbaza. La diskoindustrio atingis gigantan floradon, grandparte danke al la radio — kaj la plena eldonkvanto de la gazetoj estas multe pli granda ol en la tempo de antaŭa generacio.

Kiam alvenis la televid-aparatoj, pesimistoj supozis, ke venis fino al la librolegado. Kiel ili eraris! La lastaj dekkvin jaroj montris rimarkindan kreskon de la nombro da eldonitaj kaj legitaj libroj.

Iel pravas la ĥina proverbo, kiu diras; ke „bildo valoras dekmil vortojn”; sed ne estas parolo pri la tuta vero.

Ĉiam la homoj sopiras la presitajn vortojn — la detalojn, la eksterordinaran belecon, la emociajn profundaĵojn, kiujn prezentas al ni bona legaĵo.

(daŭrigo de kolono 2)

(sin apogante sur) observadoj kaj kalkuladoj Copernicus konkludis, ke turniĝas ne la suno ĉirkaŭ la tero, sed la tero ĉirkaŭ la suno. 11. Liaj drinkemo kaj diboĉemo morale pereigis tiun viron. 12. Tia domo jam ne (ne plu) estas enloĝebla, ĝi estas malkonstruenda.

Lingvo estas ekonomio (X) Kiel ni diru tion? Jac. Lem

Mi kredas gekamaradoj, ke ni povas konsideri nin feliĉaj, adiaŭante la homonimojn kaj ni nun kune povos malkovri aliajn lingvo-landojn kaj rigardi trans la lingvo-ebeno al pli vastaj kaj pli foraj horizontoj.

Por tio ni devas fari revojaĝon al la primitiva homo, la homo, kiu el neceso dum la peniga batalo por sia nuda ekzisto kreis ankaŭ la lingvon, la unuan kolekton de krudaj, raŭkaj krioj kaj poste tre malriĉan kaj malvastan vortrezoron. Kaj kun granda surprizo ni trovas, ke la homo, por ne troŝarĝi la memoron, dum la kresko de la kulturo, kresko de nombro de objektoj kaj ideoj, dum la riĉiĝo kaj vastiĝo de la lingvo tre ekonomie konservis multajn malnovajn, primitivajn formojn kaj parollturnojn, formojn, vortojn kaj radikojn, kiujn ni ankoraŭ uzas en la moderna vivo, nekonsiante pri la originala, prahistoria, primitiva signifo, kiu kaŝiĝas en la vorto, kelkfoje klare, kelkfoje malklare, kaj kiuj kaŝiĝas eĉ en la plej moderna lingvo de la mondo, en Esperanto. Ĉu vere nia lingvo ankoraŭ posedas primitivajn formojn kaj vortojn?

La estiĝo de la homa konscio certe estis grandparte dolora procezo. En legendoj kaj en la Biblio oni skizas ĝin kiel forlason de paradizo.

Por ni, interesitoj nur en la lingvo kaj ne en geografia ekonomio, la konscio estis forlaso de la paradizo de naturaj, animalaj, instinktaj kaj meĥanaj reagoj. La homo nun estis devigata pensi kaj uzi sian prudenton kaj devis lerni konscie egi, interkonsentiĝi kaj fari planojn kaj kompromisojn kun aliaj samgrupanoj aŭ samtribanoj. La forlaso de la ĝardeno aŭ arbaro, iam plena de nutro, iam trudis lin al la ebena, kie la vivo estis pli danĝera. La homo devis trovi kaj konkeri la nutron mem kaj eltrovis armilojn kaj ĉasiulojn. Ĉar la individuo certe estis senarma kaj senhelpa en tiu kruela batalo por la nuda ekzisto, okazis interhelpado kaj komuna agado kaj la unua socia organizado. Por tio lingvo estis nemankipova.

Per la konscio li spertis la estiĝon de doloraj sentoj. Li konsciiĝis pri la fino de ĉio, ankaŭ pri la fino de sia propra vivo kaj lernis timi la morton. Per la batalo la tribo perdis anojn kaj li spertis la doloron pri perditoj, kiuj antaŭe helpis lin, li lernis funebri pri patroj aŭ prapatroj, aŭ pri aliaj batoj de la sorto; li malkovris la sentojn de honto, de malamo, de ĵaluzo, de kolero; li spertis la perfidan perforton de pli fortaj triboj aŭ konkuruloj en propra rondo kaj trovis en la naturo gigantajn superhomajn fortojn, malamikojn, kiuj minacis lian primitivan nudan, malriĉan ekziston.

Sed ankaŭ la konscio instruis al li la certon, ke li povas ŝanĝi la naturon, ke li, la homo, estas estulo ekster kaj super la naturo, lia konscienco certigis al li, ke li povas plibonigi la naturon kaj eluzi ĝin

(daŭrigo sur paĝo 22)

Karlo Granda
Povi sorĉe starigi
Vasta
Altkreska viro
Fundamenta leĝo
Ĝisfunda; radikala
Ne senmotive
Fundamento
Esti tute prava; tute pravi
Granda
Principoj
Fondinto
Eminentulo; eminenta viro
Plenkreskuloj



OPGAVE 3.

1. Wees toch niet zo ongeduldig; dergelijke zaken hebben tijd nodig om te groeien, die *kun* je maar niet zo uit de *grond stampen*. 2. Ik veronderstel, en *niet zonder grond*, dat hij meer van die zaak weet. 3. De heer N. hield een lezing over de *grondbeginselen* van de wijsbegeerte. 4. Wat hij in dat artikel betoogt is een *grondige* omverwerping van alle bestaande theorieën. 5. Men beschouwt Darwin als de *grondlegger* van de leer der evolutie. 6. Op de *grondslag* ener neutrale taal, elkander begrijpende, zullen de volken in overeenstemming één grote familiekring vormen. (Uit „La Espero.”) 7. Een constitutie is een staatsstelsel, gebaseerd op een *grondwet*, die de vorm van het politieke regime bepaalt. 8. Op het plein bevindt zich een *groot* ruitersstandbeeld. 9. Ik betwijfel, of deze kamer *groot* genoeg is om al onze meubelen daarin te kunnen plaatsen. 10. Die avond zal lang in mijn geheugen blijven. Allen, zowel *groot* als klein (vert.: kinderen), vermaakten zich kostelijk. 11. *Karel de Grote* was een *groot man*, of hij ook een *grote* man was weet ik niet. 12. Je *had groot gelijk*, dat je hem geen antwoord hebt gegeven; op zulke onzin antwoordt men niet.



VERTALING VAN OPGAVE 2.

1. Metu tiun tason iom pli malproksime de la tablorando, por ke ĝi ne falu sur la plankon. 2. Viaj plantoj promesas bonan floradon (rikolton). Oni povas vidi, ke la grundo de via ĝardeno estas bonkvalita. 3. El la fundo de mia koro mi dankas vin pro ĉio, kion vi faris por mi; mi neniam forgesos tion. 4. Ĉu ĉi tiu arbaro apartenas ankoraŭ al la teritorio de la provinco Utreĥto? 5. Tiu entrepreno estas konstruita sur ne solida, financa fundamento (bazo). Tial estu singarda. 6. Ne ekzistas motivo (kialo) por dubi pri la sukceso de ĉi tiu entrepreno. 7. Mi ne ŝatas tian tro-riskemon, mi prefere sentas teron sub la piedoj. 8. Pro (kaŭze de) difekto en la direktila aparato la ŝipo alfundigis. 9. Ventego (ŝtormo; tempesto) kaj inundo eldetruis ĉion en kelkaj horoj. 10. Kaŭze de

(daŭrigo sur kolono 3)

Lernu ludante, ludu lernante

J. W. Minke

La enigmo en la januara numero de L.E. renkontis fortan interesigon ĉe nia regula „klientaro” kaj ĝi eĉ varbis kelkajn novajn geamikojn por nia rubriko. Komprenoble mi tre ĝojis pri tio, sed ankaŭ ĝojigis min la fakto, ke preskaŭ ĉiuj partoprenintoj en la konkurso bone solvis la enigmon. Tamen: ne ĉiuj bonaj solvoj estis egalaj. Tio ankaŭ ne estis necesa, ĉar kelkajn el la de mi menciitaj vortoj oni povis „metamorfozi” diversmaniere. Ekz. *pluvo* ni povas ŝanĝi en „pulvo” kaj „vulpo”. La vorton *trovi* ni povas ŝanĝi en „vtro” kaj „virto” sed tiuokaze le *meza* litero ankaŭ ŝanĝiĝas, pro kio oni devas serĉi por la vorto alian lokon en la vico por ne kripligi la proverbon. Same ĉe *treni*, kiu enhavas en si la vortojn „inter” kaj „terni” kaj eĉ „renti”.

Solvojn mi ricevis de: H. J. Bachofner, Bolsward; J. Bishoff-Steen, Laren N.H.; D. Blanksma, Leeuwarden; T. Brink-Blomberg, Westzaan; L. Brijn-Bas, Wormerveer; F. C. v. Dijk, Utrecht; N. J. v. Dijk-Bunnik; J. R. v. Eynde, Wilrijk-Antwerpen; Marie Greefkes, Laren N.H.; H. v. Groeneveld-Kwakernaat, R'dam; H. Hooghuis, Haarlem; A. Houter-Veltheer, Oosterbeek; J. Kesselring, Rotterdam; H. Keuter, IJmuiden; J. Koning, Paterswolde; J. Kuijpers, Rotterdam; Mia Maatman, IJmuiden; D. J. Oudenampsen, Lochem; Herman Pijpers, Breda; A. Reiné, Eindhoven; J. v. d. Rhee, Weesp; Th. A. Smit-Rous, Amsterdam; H. Tiepermann, Antwerpen; E. Weiberle, Rotterdam; P. Wolfs, Wilrijk-Antwerpen, kaj de k-do J. Winkel, Schagen, al kiu la sorto tiun ĉi fojon asignis la premion. Mi ĝojis, ke la diino *Fortuna* fine rekompencis lian persistemon, kio estu instigo al la aliaj, kiuj ĝis nun ankoraŭ ne estis sukcesaj, sekvi lian ekzemplon.

La nova enigmo estas tre simpla en sia konstruo. Ĝi estas t.n. „sablorloĝa” enigmo, kiun sendis al mi k-do N. J. v. Dijk el Bunnik. Jen ĝi estas:

- 1
- 2
- 3
- 4
- 5
- 6
- 7
- 8
- 9
- 10
- 11
- 12
- 13
- 14
- 15

La klarigoj pri la trovendaj vortoj tekstas: 1. improvizita baraĵo; 2. oleoriĉa planto; 3. saltinseкто; 4. moviĝado; 5. brua aŭ senbrua monstro de gajeco; 6. posteulo; 7. sekve; 8. vokalo; 9. prepozicio; 10. prepozicio; 11. kurba ostoj en la brusto; 12. nombro dividibla nur per si mem; 13. rekompenco; 14. tuta malvigligo; 15. ekstera tavolo de la haŭto. Viajn solvojn vi sendu rekte al mia adreso: Veeteelstraat 144, Amsterdam-O, plej laste je la 15 de aprilo. Pripensu: vi povas esti tiu, al kiu Sinjorino Fortuna asignas la premion!

Ĉu Esperanto vere vivas ?

J. Ph. Punt

OPGAVE 3.

Wanneer men nu nog een gas of een vloeistof om het uranium aanbrengt, waarmede de ontstane warmte kan worden afgevoerd, dan zijn de voornaamste bouwstenen voor een kernreactor bijeengebracht. In werkelijkheid bestaat derhalve een kernreactor uit een groot stalen vat waarin uraniumstaven zijn ondergebracht. Tussen deze uraniumstaven bevinden zich de verstelbare remstaven die door meer of minder ver in te schuiven neutronen aan het splijtingsproces onttrekken. De uraniumstaven worden omspoeld door een vloeistof (b.v. water) of een gas (koolzuur) dat de uit het splijtingsproces afkomstige warmte naar buiten voert. Om alle uraniumstaven heen bevindt zich dan nog de stof die de snelheid van de neutronen dient af te remmen. Het geheel is ten slotte binnen dikke betonmuren opgesloten teneinde te voorkomen dat voor de mens gevaarlijke stralen, die bij de splijting ontstaan, naar buiten treden. De vloeistof of het gas dat de warmte afvoert, geeft deze warmte over aan gewoon water dat, daardoor in stoom overgaande, een turbine met daaraan gekoppelde generator aandrijft die de zozeer gewenste elektriciteit levert.



VERTALING OPGAVE 2.

En la naturo ekzistas nestabilaj elementoj, kies disfalon (dissplitigon) en du pecojn (ĉiu aparte formantajn novan elementon) oni povas progresigi pafante sur ĝin neŭtronojn. El ĉi-supro montriĝis, ke pro la pli forte kreskanta nombro da neŭtronoj ĉe dissplitiĝo de pezaj kernoj kiaj de uranio (92 protonoj, 143 neŭtronoj) estiĝas pluso da neŭtronoj. Tiu pluso zorgu, ke fendiĝu aliaj urani-kernoj. Tiel estiĝas ĉena reakcio kiu, se ĝi ne estos bridata, kondukos al eksplodo. Feliĉe oni povas reguligi la nombron da neŭtronoj kiu igas daŭri la dissplitiĝon, kontaktante la split-eblan materialon kun materialoj alispecaj, kiuj avide sorbas la eventuale liberajn neŭtronojn mem ne ŝanĝigante. Aliflanke la rapideco per kiu la neŭtronoj ĉe dissplitiĝo liberiĝas, ne estas la plej taŭga por enkonduki venontan dissplitiĝon. Ila rapideco, do, estas reduktenda per interpuŝiĝo kun materialo (ekzemple akvo aŭ grafito) antaŭ ol ili ekhavas la ŝancon trafi alian urani-atomon.

(daŭrigo de paĝo 21)

por helpi en la granda batalo. Li lernis ne nur timi la grandajn fortojn, sed ankaŭ honoro kaj adoro ilin, li lernis ne nur funebri la mortintajn prapatrojn, sed ankaŭ memori kaj posthonoru ilin, dum iliaj kuraĝaj kaj bonaj, altaj kaj heroaj agoj instigis lin por imiti kaj sekvi iliajn ekzemplojn. Por helpi kaj subteni la memoron kaj por fortigi sin en la luktado kontraŭ malamikaj fortoj li bezonis ion videblan, ion palpeblan, ion konkretan. Li komencis fari bildojn, objektojn, figurojn kaj signojn, kiuj helpis lian ankoraŭ tre limigitan imagon. Li estis survoje de pure materia al spirita kaj mensa vivo. Paŝon post paŝo, eble helpate de grandaj sociaj kaj naturokazoj, la pensado de

Antaŭ la Elementa Ekzameno

C. P. Westerveld

OPGAVE 3.


Wie wil iets over walvissen weten?

Dat een walvis geen vis is maar een zoogdier en dus levende jongen ter wereld brengt weet u wel, maar wist u ook: dat een pasgeboren walvisbaby zeven meter lang kan zijn en dat zo'n baby iedere dag meer dan vier centimeter groeit? dat een gewicht van twintigduizend kilogram gen uitzondering is? dat de „spuit” van een walvis geen water is maar vochtige, warme, uitgeblazen adem die in de koude lucht condenseert tot een mistfontein die zes meter hoog kan worden? dat de tong soms wel zeshonderd kilogram weegt? dat de walvissen „trekvissen” zijn en bijgevolg niet alleen in de ijszeeën, maar ook in de tropische wateren voorkomen? dat uit het spek, het vlees en de beenderen niet slechts traan, maar ook geneesmiddelen zoals vitamines, insuline en hormonen geproduceerd wordt? dat de lippenstift en de crème van onze dames heel waarschijnlijk ook van de olie van een soort walvis gemaakt worden?

VERTALING VAN OPGAVE 2.

Alia formo de aerreklamo estas la aerskribado per fufliteroj. Speciala oleo de alta premo estas ŝprucata en la elkondukilon. Ĝi estas subite varmigata ĝis kvin- aŭ sescent gradoj da Celsio, tiam ĝi venas en la malvarman atmosferon, tuj kondensigas kaj tiamaniere formiĝas „fumo”. La literoj, kiuj estas skribataj en la aero, estas unu ĝis tri kilometrojn grandaj. Por la aerskribado estas bezonata blua ĉielo. La literoj estas skribataj en alteco inter tri kaj kvin kilometroj. Termiko kaj vento estas fatalaj. Kelkfoje okazas, ke kelkaj literoj pli frue malaperas ol aliaj en iu vorto. La kaŭzo estas certaj aerfluo. Okazis, ke vorto staris dum dudek minutoj, sed tio estas escepto. La allogeco — el reklama vidpunkto — estas la skribado mem, ĉar ĉiu klopodas diveni, kiu vorto fariĝos. La skribado grandparte konsistas en la farado de tre krutaj kurboj. Ĉi tiu laboro postulas multe da peno, sed ĝi certe estas fascinanta.

la homo progresis; iaj ideoj pri bono kaj malbono iĝis pli certaj, li kreis ian moralon, kiu donis sankcion al liaj agoj, sian spiritan mondon li vivigis per iluzioj, fantazioj, esperoj kaj revoj, kiuj kune helpis al li superi la vivodoloron, li kreis al si iun revon pri la estonto, iun idealon, komence iun idealan staton en la postmondo post la morto, li lernis konsoli sin per revoj, li lernis kontentigi sin per iluzioj, li superis la interbarilan malvastan ĉirkaŭon de malfaciloj kaj mizeroj, ĝis li fine atingis ankaŭ la grandan imagon, la belon. Jen la granda aventuro de la evoluo de la homa spirito komencis sian brilan kaj multfoje elrevigan vojaĝon, la homo kreis el materio spiriton, la homo pene grimpis de percepto al koncepto. K-do S. A.



Urba Parko kun lageto,
Groningen.

(Kliŝo VVV, Groningen)

Groningen bonvenigos vin

Tuj apud nia Kongresejo kuŝas la Urba Parko de Groningen.

Ĝi iam estas fondita de Jan Evert Scholten, famkonata industriisto, kies skulptaĵo en la parko rememorigas lin. En la parko estas pluraj lagetoj, konata ĉevalkurejo, sportkampoj, belega pavilono kaj birdkaĝejo.

Oni promene, bicikle aŭ aŭtomobile povas traveturi la tutan parkon, kaj ĝi daŭre estas malfermita.

Malantaŭ en la parko nun ankaŭ troviĝas tre moderna kampadejo.

Do, bela okazo por la kongrespartoprenantoj distri dum la paŭzoj en la parko, almenaŭ se la vetero allogas. Sed, pri tio ni kalkulas, ĉu ne?

Do, ĝis renkontiĝo! G. J. Minholts.

Via 43-a kongreso

Groningen, la 21an kaj 22an de marto 1964.

Kongresejo „Onderwijscentrum Prof. v. d. Leeuw”, Verzetstrijderslaan 2 (angule de Paterswoldseweg).

(daŭrigo de paĝo 20)

Ĉu vi estas instruist(in)o? Ĉu vi foje partoprenas t.n. gepatran kunvenon en lernejo? Ĝuste ankaŭ en tiuj kunvenoj laŭ la supra „recepto” prelegoj estus eksterordinare gravaj! K.t.p.

Ne forgesu, ke la interesiĝo pri Esp. ĝuste konstru-forme parol(ig)is pri ĝi; tion oni aŭskultu kaj rigardu al la radio kaj televido! Jam kvarfoje en unu monato oni konstru-forme(igis) paroli(s) pri ĝi; tion oni nepre ne farus, se Esp. estus ne objekto staranta en la fokuso de la interesiĝo!

Karaj geamikoj, permesu ke provizore mi finas atentigante vin pri ne sufiĉe ekspluatata propagando-vojo, kiu pro multaj kaŭzoj eksterordinare gravas; mi havas la konvinkon, ke ĝi povus eĉ esti unu el la vojoj, por konduki nin el nia mortiga izoleco. Estas ia „ovo de Kolombo”: gajni kiom eble da Simpatiantaj Membroj!

Estas labortereno tiom grava, el tiom da vidpunktoj, ke mi en ĉi eta spaco eĉ ne kuraĝas pli diri pri ĝi... Pripensadu mem... kaj, kiam iu al vi diros: „Individua lernado ne utilas; oni devus instrui ĝin en la lernejo” (aŭ ion tian), diru, ke li/ŝi povas kunhelpi rompi la magian cirklon, estiĝante Simpatianta Membro!

Ek al la batalo en 1964!

I. Schoon.

Prezidanto: k-do R. Israëls.

Sekretario: k-do G. J. Minholts, Stadsweg 3, Oosterhogebrug (Gron.), telefono 05900-23687.

Kasistino: k-dino A. Minholts-Balkema, adreso ktp. sama, poŝtĝiro 912809.

Kiuj trajne venos en Groningen, bezonos proksimume 15 minutojn por veni al la kongresejo: elirinte la stacidomon iru maldekstren ĝis Paterswoldseweg, suriri tiun ŝoseon en direkto eksterurben, pasu fervojon kaj tri minutojn poste al via dekstra flanko staras la kongresejo.

Aŭtoŝtonaj groninganoj asertas ke uzi aŭtobuson daŭras egale longe, ĉar por trafi la ĝustan linion necesas unue eniri la urbocentron.

Kiuj aŭtomobile venos laŭ la „Afsluitdijk” estas konsilinde la direkto Bolsward-Groningen. Enirante la urbon Groningen vi ankaŭ trafas la Paterswoldseweg kaj suriru ĝin en la direkto de la urbocentro. Antaŭ la fervojtransirejo vi maldekstre povos vidi „Onderwijscentrum Prof. van der Leeuw”.

Al ĉiuj legantoj

(sed speciale al sekci-estraranoj!)

Multaj sekcioj havas kunvenojn kun interesajtemoj, aŭ iniciatas ion, pri kio preferu sciu ni ĉiuj por ke samtempe en multaj lokoj oni agu en unu objekto. Sed la modesteco devigas vin silenti pri via agado kaj tial ankaŭ nur en malgranda rondo estas ĝojo pri atingita sukceso. Sed karaj legantoj, ie ni sentas nin — malgraŭ tre fore — anoj de unu familio kaj vi scias ke en multaj familioj oni kutimas scii ĉion de la aliaj por ke oni intime klaĉu, akre kritiku, sed ankaŭ por ke oni kune ĝoju kaj havu zorgojn.

Mi esperas ke la vortoj pri klaĉado kaj kritiko ne timigas vin, sed ke vi ek de nun regule sciigu al la tuta familio pri viaj spertoj en la organiza vivo. Ni ĉiuj lernu unu de la alia. Prefere tiuj raportoj pri via vivo estu skribataj de sekcia estrarano, ĉar li aŭ ŝi plej bone povas scii ĉiujn necesajn detalojn. Ne estas la celo, ke vi skribu prozon 2-paĝan aŭ pli, sed ke ni havu pri ĉiuj viaj entreprenoj raport(et)on, kiun iel povas utiligi la aliaj sekcioj.

A. B.

Vagado tra verdaj ondoj

Kiel vi verŝajne scias diversaj radiostacioj eksterlandaj dediĉas elsendojn al nia kara internacia lingvo. Sed ĉu vi ankaŭ iam penis trovi kaj aŭskulti tiujn elsendojn? Mi opinias ke tro malmulte da esperantistoj aŭskultas eksterlandajn esperanto-elsendojn kaj tiel oni ofte maltrafas interesajn sciigojn pri la esperantista vivo en aliaj mondpartoj.

Dum la lastaj monatoj mi ofte serĉis (kaj eĉ trovis) la esperantajn elsendojn, pri kiuj vi ĉiam povas legi en via programgvidilo.

Ĉar tiuj elsendoj havas grandan propagandan valoron por nia afero, estus grava perdo por nia movado, se oni ĉesus tiujn elsendojn pro manko da intereso de la aŭskultantoj kaj por eviti tion la prezentantoj ĉiufoje petas al la aŭskultantoj skribe konigi komentojn pri la ricevebleco.

Per multaj ricevitaj leteroj ili pruvas al la direktoroj de la radiostacioj ke la esperantlingvaj elsendoj estas aŭskultataj de sufiĉe da homoj por daŭrigi ilin. Mi ĉipere volas instigi vin almenaŭ unu aŭ dufoje en jaro sendi skriban raporton al tiuj stacioj kiuj regule uzas esperanton.

Unuavice staras la *Pola Radio* kiu ĉiutage elsendas dum duona horo (16,30—17,00) ondlongeco 30,01 - 30,45 - 41,18 - 41,99 - 42,11 - 48,90 - 50,42 kaj 200 metroj.

Radio Svislando: lunde kaj merkrede 13.10 h.; ĵaŭde kaj sabate 22.15 h.; 31.46 kaj 48,66 metroj.

Itala Radio: marde, merkrede kaj vendrede 18,55 h.; 30,90 - 41,24 kaj 50,34 metroj.

Radio Sofio: dimanĉe 20.00 h je 39 metroj; 24.30 h je 25,32 kaj 31,38 metroj.

Radio Praha: ĉiun lastan ĵaŭdon en la monato 18.50 h; 233,3 metroj.

Radio Zagreb: (kaj Beograd): ĵaŭde 24.05 h; 264,7 kaj 439 metroj.

Radio Vieno: marde 17.50 h; 25 kaj 293 metroj (parolas kelkfoje germanlingve pri esperanto).

Mi deziras al vi bonan kaj interesplenan ĉasadon!

v. d. Horst

(el „Nia Ligilo” - marto)

Ankaŭ ni atentigas je la elsendoj de V.A.R.A. (Radio Hilversum), kiu ĉiu vendredo elsendas socialisman novaĵon en Esperanto. La elsendtempon oni forŝovis al tre nekonsvena horo. Plendoj pri tio povas helpi al rea elsendo je pli favora horo.

Elsendo nun ĉiun vendredon je 23.45-a h., 298 metroj (1007 kHz).

Esperanto en la universitatoj ĵus atingis nin la sciigo pri enkonduko de Esperanto en la universitatoj de Sofio (Bulgarujo) kaj Laguna-Tenerife (Kanariaj insuloj). Tiuj rezultoj estas favoraj dank' al la laboro de respektive sinjoro Atanasov kaj Régulo Perez. Al ambaŭ niajn korajn gratulojn!



S.A.T.-kolono

La 37-a SAT-Kongreso en Narbonne

Kongreskotizoj:

Oni atentu ke post 31 marto validas la jenaj kongreskotizoj

SAT-anoj	f 13,75
SAT-geedzoj	f 21,25
Junaj SAT-anoj (15-20)	f 9,50
Gastoj	f 17,50

Kongreskaravanoj:

Se sufiĉe da aliĝantoj anoncos sin ni aranĝos du vagonarajn karavanojn al la kongreso, nome:

Karavano A

starto kune vendredo 24 julio el Roosendaal je ĉ. 13.- h.

alveno en Narbonne je sabato 25 julio je ĉ. 7.- h.

reveno el Narbonne je sabato 1 aŭgusto je ĉ. 21.- h.

alveno en Roosendaal je dimanĉo 2 aŭgusto je ĉ. 15.- h.

Karavano B

Starto kune kun karavano A; reveno unu semajnon post Karavano A (samaj horoj).

La prezo

La prezo por la vojaĝo dependas de la nombro de partoprenantoj.

Provizore ni fiksas la prezon je f 135,- (tien kaj reen). Dormloko en la trajekto Parizo-Narbonne kostas f 29,- (tie kaj reen).

Kiel kutime ni post la kongreso repagos eventuale tro pagitan sumon.

Aliĝoj:

Ĉar ni frue devas mendi la lokojn en la vagonaro, ni baldaŭ devas scii ĉu estos sufiĉe da partoprenantoj.

Tial oni devas nepre antaŭ 15 aprilo sin provizore anonci, menciante ĉu oni deziras partopreni karavanon A aŭ B. Poste ĉiu anoncinto ricevos aliĝilon kun sciigoj pri la pagmaniero ktp.

Oni anoncu sin ĉe:

C. van Essen, Floretstraat 10, Rotterdam 26, telefono 192584, Poŝtkonto 86033, al kiu adreso oni sendu ankaŭ la kongreskotizon kaj kongresaliĝilon.

Por informoj pri la kongreso mem oni turnu sin rekte al la OKK en Narbonne.

C. v. E.

Semajnfino de „Faulhaber-Fondaĵo”

okazonta la 11-an kaj 12-an de aprilo en Wijk aan Zee, naturamika domo „De Banjaert”.

Post la sciigoj en la februara numero de L.E. ni nun povas informi vin pri la programo pli precize.

Sabate:

Alveno inter la 16a kaj 18a horoj.

18.00 Panmanĝo.

19.30 Malfermo.

19.45 K-do Punt: Kiel konvinki la homojn, kiuj asertas „Mi ne havas tempon”.

20.30 Kafo. Diskutado kaj interŝanĝo de spertoj.

21.15 Eventuale: promenado en la ĉirkaŭaĵo.

23.00 Iom manĝi. Enlitiĝo.

Dimanĉe:

9.30 K-do de Vries: „Kiel organizi?”

10.15 Kafo. Diskutado kaj interŝanĝo de spertoj.

11.00 K-do Minholts: „Propagando de Esperanto precipe en la laboristaj rondoj”.

11.45 Diskutado kaj interŝanĝo de spertoj.

12.00 Lunĉo.

13.30 Libera diskutado pri diversaj lingvaj kaj aliaj temoj.

(Demandojn oni sendu antaŭ la 1a de aprilo al la sekretario de la fondaĵo:

k-dino J. J. Schouten, Neptunusstraat 39, Haarlem-N.)

15.00 Fermo.

La kunvenojn prezidos k-do Faulhaber. Kiel vojaĝi:

De Beverwijk per aŭtobuso al Wijk aan Zee. Eliri: Oldenburgweg (de tie promeni 3 minutojn al la naturamika domo „De Banjaert”).

Oni kunprenu:

littolajon (por kelkaj estas eble lui tion en la domo) kaj tualetaĵojn.

Tranoktado en 2-, 3- aŭ 4-litaj ĉambroj. Antaŭ la foriro oni kune ordigu la ĉambrojn kaj la kuirejon.

La estraro rajtos ŝanĝi la programon, se estos necese.

J. J. Schouten, sekretario.

(ne-korektita)

Kvin polaj samideanoj veturos per aŭtomobilo al la Universala Kongreso, sed ek-timis pro la altaj loĝadaj prezoj en Nederlando. Tial ili petas, ĉu ie en la ĉirkaŭaĵo de Den Haag (veturdistanco per aŭto ne pli ol ekz. duonhor) estos trov-eblaj du senpagaj aŭ tre malmultekostaj litoj por 10 noktoj, komence de aŭgusto. La kvinopo konsistas el tri viroj, kiuj estas pretaj dormi en tendo, sed por la patrino kaj la filino oni bezonas „veran” loĝejon. Kiu helpas?

Skribu al: s-ano W. S. Majewski, str. Zabkowska 27/31, Varsovio.

ESTRARAJ KOMUNIKOJ

Ekspedo L.E.

Kelkfoje la anoj kiuj transloĝis aŭ ek-siĝis, sciigas al la estraro ke ili ricevas 2 gazetojn aŭ ke (kvankam ili transdonis la novan adreson) tamen L.E. venis al la malnova adreso.

Fakto estas ke la presisto (kiu samtempe estas la ekspedisto) deziras havi la ŝanĝojn en la lasta semajno de la monato, do nur la ŝanĝoj kiuj atingas nin antaŭ tiu dato povos esti administrataj por la sekvonta gazeto.

Tamen L.E. dum kelke da monatoj venos al la malnova adreso, ĉar la presisto uzas la bandarolojn el provizo kaj estas tro da laboro — elserĉi la ŝanĝitajn adresojn. Ni esperas ke tiu ĉi eksplico forprenas miskomprenon rilate la ekspedon.

Ĉu necesas ĉiun kvaronjaron sendi membrolistojn?

Tiel foje oni demandas al ni. Simpla kalkulo: jaro havas kvar kvaronojn, unu fojon en jaro ni deziras kompletajn membrolistojn de la sekcioj, tri fojojn ni kontentigas ekscii nur aliĝojn, ekscigojn: do la ŝanĝojn. Ĉu ni atendas tro, se ni deziras ke ĉiu sekcia sekretario unu fojon en tri monatoj skribu al ni ke aliĝis Jansen, ek-siĝis De Bruin? Ne timu labori!

Nagekomen bericht betreffende ons kongres

In de eerste werkvergadering op zondagochtend zal een referaat gehouden worden door mr J. W. Nobel, medewerker aan het Polemologisch Instituut te Groningen. Dit instituut houdt zich bezig met het bestuderen van de problemen van oorlog en vrede.

K-dino A. H. Houthuysen-Smit, Fannius Scholtenstraat 12 en Amsterdam-West, Nederlando, deziras korespondi kun samagulinulo (31-jara), loĝanta en Eŭropo.

Actie suikerzakjes

Het is mogelijk een goede propaganda te voeren middels de verkoop van suikerzakjes. Deze zakjes kunnen (uiteraard gevuld met suiker, zoals ze van de fabriek komen) verkocht worden aan hoteleigenaren e.d. tegen de voor deze gebruikelijke prijs. De voorwaarde van de fabriek echter is om, wil men de kosten zo laag mogelijk houden, 50 dozen aan één adres af te leveren. Het lijkt ons niet zo heel moeilijk om 50 dozen à 1000 zakjes in verschillende restaurants te plaatsen. De vastgestelde verkoopprijs is:

1 t.m.	2 dozen	f 15,70	per doos
3 t.m.	4 dozen	f 15,20	per doos
5 t.m.	9 dozen	f 14,70	per doos
10 t.m.	14 dozen	f 14,20	per doos
15 t.m.	24 dozen	f 14,—	per doos
25 t.m.	49 dozen	f 13,85	per doos
	50 dozen	f 13,65	per doos

Bestellingen worden verwacht bij de Bondspenningmeester, k-do V. Oosten, Wingerweg 53, Amsterdam-N. Postgiro no. 33 11 33.

